

## Anteo (Ĉinujo)

2013.07.12



*kinja amitato savas?*

laŭplane mi havis blankan nokton  
por pensi pri plago natura aŭ artefarita.  
kial hipopotamo herbmanĝa murdis  
vegetaraninon, kiu kredis je savo spirita?

2013.04.24

*magia forto*

korvino sub la formo de homo  
en meditado sidas sur roko,  
knedante larmojn siajn roseroj  
por nutri kredon iĝi virkoko.

2013.07.13

*milito inter potencoj*

aziaj boaoj dungite envenas  
amerikon, kie regas krokodiloj kun di-fortoj.  
du potencoj interbatas ofte por manĝajo  
riĉa.  
jen unu englutas alian - du mortoj.



*tigro*

fajro pro cigaredo lin fuĝigis el ĝangalo.  
la kaĝo fera plenas de legomoj - sen viando.  
se nur li nun ne loĝus kun la leoninoj piai,  
idaro ŝanĝus la feejon al besteca lando.

2013.06.2

*gardenifloroj*

gardenifloroj ĵus aĉetitaj kontraŭ nur moneroj  
prosperas en angulo de memoroj kun ĉeneroj.  
neniam forgesitaj larmoj pro la gajo torĉa  
en la kristalo pulsas, nutras plorojn pri  
partneroj.



2013.05.31

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



*Lasthore*

En l' animekzilo,  
rivero el voĉoj  
serĉante min  
serpentumas.

Kaj en la teksaĵo

de l' silento  
dormanta ŝtono  
pulsas atende al Sun'.

De tempo al tempo,  
mi diamantas matene;  
de tempo al tempo,  
gutas voĉo kaj surverŝas  
mian nedresitan parolon...  
Malfacilas reveni al Hejmo.

Juiz de Fora, 05/08/2016

## Paŭzo

Birdo vundita, mia ŝultro  
ankoraŭ mondon subteni revas,  
malgraŭ miro de l' dioj kaj titanoj.

Kaj tiel gaje ripozas  
ŝarĝon gardi la sekreto,  
kiu pli kaj pli malpeze malpleniĝas:

la magio senhaste maljuniĝi  
sub la serena jugo de l' Poezio.

Juiz de Fora, 16/08/2016.

## Mori (Usono)



## Hundo

(1)

Hundojn, kiuj kun knabinoj  
surstrate promenas  
mi tre ŝatas!  
Ofte mi haltas  
kaj mi demandas  
pri ĝia nomo  
kaj ĝia aĝo  
kaj ĝia raso.  
Ni pluparolas  
pri la vetero  
kaj la cetero...

pri politiko  
kaj la milito  
kaj Prezidento;  
la idioto!  
Telefonnumerojn  
ni interŝanĝas  
kaj rendezvuon  
tuj ni aranĝas.  
\*  
Hundojn, kiuj kun knabinoj  
surstrate promenas  
mi tre ŝatas.



(2)

Amiko al mia kor' donis vundon  
mi do havigis al mi belan hundon  
ĉar amo de l' hund' estas senkondiĉa  
egale; estu riĉa, aŭ malriĉa  
hundo ĉiam estas al vi fidela  
egale; estu bela, aŭ malbela  
ĝi ĉiam staras je via flanko  
sen plendi pri via konduto kaj manko  
al hundo ĉiam viaj faroj plaĉas  
Kaj pri sia amiko ĝi neniam klaĉas  
kiam ajn vi estas kun fremdaj uloj  
ĝi gardas vin per siaj akraj okuloj  
kiam ajn vi forestas ĝis la vespero  
ĝi atendas vin kun granda espero  
kiam vi revene aperas sur la voj'  
ĝi celebras tion per sinsekva boj'  
kiam vespere vi dormas sur l' lito  
ĝi dumnokte gardas vin sen hezito  
hundo ne amikemas por profito  
ĝi staras ĉe vi eĉ dum milito  
hundo ja estas fidela amiko  
ĝia amikeco ne estas politiko  
hundo ne estas kiel najbarulo  
kies amikeco estas laŭ kalkulo  
nek ĝi estas kiel alia amiko  
kiu vundas vian senton per kritiko

jes, hundo ne estas kiel ni saĝa  
 sed kiel homo ne estas du-vizaĝa  
 hundo ne agas kiel viro malica  
 nek kondukas kiel virino kaprica  
 hundo ne forgesas viajn bonfarojn  
 kaj ĉiam pretervidas viajn erarojn  
 hundo al homo neniam perfidas  
 eĉ tiam, kiam neniu ĝin vidas  
 por la hundo, ĉiam vi estas bela  
 tempopaso kun vi estas miela  
 ĝia fideleco daŭras ĝis l' morto  
 hundon forportas nur la morto-forto  
 hundo estas pli afabla ol homo  
 kvankam "Hom'" ne estas ĝia nomo  
 se samkiel hund' fidelemus homo  
 feliĉo ekzistus en ĉies domo  
 ho ve, ke hom' ne estas kiel hundo  
 tial en ĉies koro estas vundo  
 ekde hodiaŭ pro mia kor-vundo  
 mia bona amik' estas mia hundo.

### Rustam Karapetjan (Rusio)



## Du poemetoj

Hieraŭ mi Hitleron ŝajne renkontis.  
 Li eksterurben hastis kun stablo  
 Kaj lin ankoraŭ neniu atentis,  
 Krom alta kaj lama sinjoro  
 Kun nigra sciama pudelo.  
 Flirtis vienaj valsoj.  
 Kaj serena Ĉielo  
 Estis tiel pura  
 Kiel larmeto  
 De judknabo  
 Diafana  
 Fajna  
 Dia.  
 \*\*

Dum kontaktas niaj resonoj  
 Kaj kuniĝas tre ne singarde,  
 Ŝajnas ke ne eblas pli bone,  
 Ŝajnas ke ne eblas pli alte.

Sed meznokt' alian aŭguras  
 Kaj inspiro kreskas en koroj  
 Dum flugiloj niaj susuras  
 Inter steloj diverskoloraj.



### Cezar (Germanujo)



## Morta birdo

La morta birdo kvazaŭ krias,  
 ke ni enaŭte ne rapidegu tiom!  
 Ĉar ankaŭ birdo tia,  
 kia ĝi volis vivi,  
 senti ĝojon kiel ni.

Estu ĉiam  
 atentema!  
 Respektu vivon.  
 Ĉio alia tiukaze  
 troviĝos.

Kaj, se vi denove  
 pro hasto kaj memfororgesemo  
 ekrapidigos vian aŭton,  
 tiukaze tuj haltu,  
 veturigu la aŭton  
 al la vojorando  
 kaj senrapidigu vin enmense.



# art' pro arto

(I)

(poemo pri la arto diri nenion)

art' pro arto  
pro aparto  
tuj de l' starto  
por bonfarto

jen poemo  
do sen temo  
sed pro emo  
sen problemo

sen vizaĝo  
kaj sen saĝo  
nura kaĝo  
sur la paĝo

arta horo  
por adoro  
art' pro oro  
kun fervoro

art' pro arto!  
ombra farto  
poŝtokarto  
el Dĵakarto

(II)

(poemo pri la arto kun mona bonfarto)

art' por enspezo  
pro certa tezo  
kun artolezo

art' por merkato  
por komercfrato  
eĉ sen kompato

art' por riĉulo  
pri iu pulo  
investpostulo

art' por enspezo  
kun klaŭna tezo  
pro interezo

art' por profito  
kaj eĉ sen spito  
por monmefito

## Paŭlo Silas (Brazilo)



# SUFICÊ!

— Diris figur', el nebul', veninta.

Por nun sufiĉas, lang' malbeninda!

Ripozu l' impeto!

Kaj la figur' fantoma,

De sur la rivermezo,

Kriis, ordon-tona:

Fi! Ribeluloj! Al vi, kler' mankas.

Per viaj vortoj, la nigro blankas.

Eraron profundan

Vi prenis kiel verdiran pravon!

Atentu la sangelverŝan kavon,

Brustmezan kaj vundan.

Justan moralon misinterpretas

Mi' senrezona, kompren' eteta.

Devodeflankiĝoj

Vin malvirtigis tute.

Vi, anarkiistoj,

Dum opiniis krude!

Eltenis mi la tempest-mantelon tiam

Por savi vin. Danku pro sindono mia!

Apenaŭ malfermis la buŝon la ido  
 De pasintatempa homar'  
 Antaŭ la preskaŭ preĝeja prediko.  
 Poste, diris ĝi sen detal':

Vojmeze furiozas sun'.  
 Ne brilas ĝi egale dum  
 Matena suprenir' sublimes,  
 Nek dum la subenfal' rutina.

Ĝi simple iras sian vojon.  
 Nature kaj instinkte estas.  
 Ekzisti aktuale plu.  
 Neniam, tamen, ĝi perfektas.

Nun varmas tro. Tro da intenso.  
 Malvarmas nun. Nune eraras.  
 Ĉu, sekve, bridu la intencon?  
 Ĝusteco ne universalas.

### Takashi Ito (Jananujo)



## trista fontano ...

vakua cikad' ...  
 nur nulo aperas el  
 la dorsa fendo


somera maten' ...  
 jen nova bukedo ĉe  
 tombo kaduka

radii sunon ...  
 inspiro kun bela ŝvit'  
 olimpikoj nun

trista fontano ...  
 kelke da lunoj ludas

akvosurface

akvomelono ...  
 la sunon mi aŭdace  
 kvazaŭ formanĝus



### Zara Sarkissianne (Francio)



## Bonan mateniĝon

Kiam Luno laciĝas en ĉielo;  
 Foriras por ripozi en liton,  
 Ŝi alvokas kviete al la Suno:  
 "Venu! Kisu Teron kaj Maron".  
 La Mondo respegulos ĝoje  
 Sub Sunaj radioj lumiginte,  
 Kiel la Fairo en Horizonto,  
 Dancas surface, kiel bel-ondo.

03/06/2016

## Knabin'el Ipanema

(kantteksto)

Tie ŝi venas knabino  
 kun kiom da ĉarmo  
 pasanta diino  
 sen iu alarmo  
 leĝere alpaŝe  
 al proksima mar'.

Ino kun haŭto el oro  
 de l' sun' de Ipanema,  
 invit' al esploro  
 de korpo poema,  
 mirindaĵ' al koro  
 kaj ĉi okulpar'.

Ha, kial estas mi sola?  
 Ha, kial mi tiel tristas?  
 Mi vidas, bel' ja ekzistas!  
 Jam por mi estu ĝi do konsolo,  
 ĝi ankaŭ promenas en solo.

Ha ŝi eĉ ne scias,  
 ke kiam ŝi pasas  
 jam la tuta mondo  
 enuon forlasas,  
 kaj multe pli belas  
 nur kaŭze de am'.



*Esperantigis*



**Uel Roŝa (Brazilo)**

**Bedri Alimehmeti**



*La morto de  
 Marilyn Monroe*

Marilyn Monroe ne plu estas.  
 La doloron jam sentis la tuta globo.  
 La stelo numero uno de la ina sekso estingiĝis.  
 La ondoj de la larmoj,  
 Puŝis la homojn al la funebra procesio.

Ĉu vi povus,  
 Vi, nigra tero?  
 Solvi la korpon de la via plej bela kreitaĵo!  
 Kiel vi faros vi freŝa herbo?

Ĉu vi kuraĝos,  
 Kovri la ĉarmon  
 De ĉi tiu beleco nekomparebla!  
 Kaj vin, nokto de la eterna mallumo  
 Ĉu vi ne bedaŭros  
 Estingi la muaron de la briletantaj okuloj?

Marilyn Monroe  
 Ne plu estas.  
 En iu nia ĵurnalo.  
 Verkistaĉo- plumulaĉo  
 Publikigas la felietonon "Vringita citro",  
 Ĉu vi sciis, Dio mia,  
 Ke sur la globo  
 Estas homoj ne konantaj la doloron?

## La junulino el Tirana

La varmecon de la rigardo  
 Vi jam forprenis de la brilaj sunradioj.  
 O, suna junulino el Tirana!  
 La porcelanan blankecon de la haŭto  
 Vin jam donis la neĝo de la Dajti- pinto.  
 O, pura junulino el Tirana!  
 La verdecon de la okullumoj,  
 Vin donacis la kronaj montetoj.  
 O, verda junulino el Tirana!  
 La bluecon de la animo  
 Vi forprenis de la horizontaj spacoj.  
 O, ĉieleca junulino el Tirana!  
 La radiadon de la beleco vi jam absorbis  
 El la matena roso.  
 O, kristaleca junulino el Tirana!  
 La persikecon de la vizaĝo  
 Vin donacis la matena purpuro.  
 O, freŝa junulino el Tirana!  
 La vian altstaturon  
 Plilongigis la cipresoj de Namazgja<sup>1</sup>.  
 O, markoteca junulino el Tirana!  
 Vian silkan hararon  
 Ellavis la akvofontoj de Selita<sup>2</sup>,  
 Streĉitajn vi lasis ilin sub la briletantaj  
 sunradioj,  
 Dum ilin kombis la luna arĝentado.

O, sorĉeca junulino el Tirana!

notoj:

1. Verda parko en Tirana
2. Famaj akvofontoj de Tirana

## MI NE SCIAS

Mi ne scias  
 Ĉu ja estis  
 La radiado de la brilo de la viaj okuloj.  
 Aŭ la briletado de la rideto,  
 Sur la rozecaj lipoj.  
 Aŭ eble la korpa ĉarmo,  
 Kun la perfekteco de la kurboj.  
 Aŭ via parolanta nomo,  
 Enhavis en si  
 Tiun fajreton,  
 Ardiginta mian koron,  
 La plej majestan senton,  
 Humanan,  
 La amon.  
 Mi ne scias, ne, mi ne scias.



## Somerofino

Sur la ruĝa altano de la vespero,  
 Enfalas la flavaj aŭtunaj folioj.  
 Tufo de migrantaj birdoj  
 Atendas sur la dratoj ekflugi.  
 Kaj homamaso da vojaĝantoj  
 Sur la griziĝinta stacidomo, pro la krepuska  
 nebulo,  
 Atendas la trajnon por ekveturi.  
 Tra la vagonaj kupeoj  
 Krom la varmecon de la alpremitaj manoj,  
 La vojaĝantoj akiras ankaŭ la kisanan pasion.  
 Dum la birdoj,  
 Dum la foriro, kia bedaŭro!

Kunportas ankaŭ la someron en sia migrado.

*Esperantigis*



**Bardhyl Selimi**

(Albanio)

**Zhuangzi (369-286 a.K)**



# Zhuangzi

**ĈAPITRO SESA**

## La plej respektinda instruisto

### §06-07

Yan Hui diris al Konfuceo: “Mi jam progresis.”

“Kion vi volas diri per tio?” demandis Konfuceo.

“Mi forgesis,” respondis Yan Hui, “la humanecon kaj la justecon.”

“Tio estas bona,” diris Konfuceo, “sed tio ne estas sufiĉa.”

Iun alian tagon Yan Hui denove renkontiĝis kun Konfuceo kaj diris:

“Mi plu progresis.”

“Kial vi tiel diris?” demandis Konfuceo.

“Mi forgesis la ritajn regulojn kaj la muzikon,” respondis Yan Hui.

“Tre bone,” diris Konfuceo, “sed ankoraŭ ne sufiĉe.”

Ankoraŭ iun alian tagon Yan Hui denove renkontiĝis kun Konfuceo kaj diris:

“Mi ankoraŭ plu progresis.”

“Kion vi volas diri per tio?” demandis

Konfuceo.

“Mi povas sidi kaj forgesi,” respondis Yan Hui.

“Kion do signifas ‘sidi kaj forgesi?’” demandis Konfuceo mirigite.

“Mi povas forĵeti miajn membrojn kaj trunkon, rezigni mian inteligentecon, forlasi mian korpan formon kaj senigi min je mia menso. Tiamaniere mi povas identigi min kun la Taŭo. Tio estas la tiel nomata ‘sidi kaj forgesi’.”

“Kiam vi identigas vin kun la Taŭo,” diris Konfuceo, “vi havos neniam preferojn kaj malpreferojn; kiam vi transformiĝas kun estaĵoj en la mondo, vi sekvos nur la naturan evoluadon. Vi vere estas saĝulo. Mi vin sekvos.”

#### §06-08

Ziyu kaj Zisang estis bonaj amikoj. Foje, kiam pluvis kontinue dek tagojn, Ziyu diris al si mem: “Mi timas, ke Zisang povas esti en malbona farto.” Li do pakis iom da nutraĵo kaj portis ĝin al Zisang. Kiam li alvenis al la pordo de Zisang, li aŭdis ies voĉon, duonkantantan, duonplorantan, kiu estis akompanata de liuto:

“Ho patro!

Ho patrino!

Ho Ĉielo!

Ho homo!”

La voĉo estis tre malforta kaj la poemaj vortoj estis hakataj.

Ziyu eniris kaj demandis:

“Kial viaj versoj sonas tiele?”

“Mi penas pensi,” respondis Zisang, “kiu faras min tiel mizera, sed mi pensadas vane. Ĉu miaj gepatroj volas, ke mi estu tia? La ĉielo kovras ĉiujn estaĵojn egale; la tero subtenas ĉiujn estaĵojn egale. Kiel ili povus fari min tiel aparte mizera? Mi neniel eltrovis la kaŭzon de mia mizero. Do devas esti la destino, kiu igas min suferi tiun ĉi ekstreman mizeron!”

*Elĉinigiŝ*



**Wang Chongfang**

(Ĉinujo)

**Ĉineske**

**Vejdo (Ĉinujo)**



*Sopiřemo pri vi*

—laŭ ĉinesko Sopiř-al-sudo\*

Subite

vin deturnis vi  
por foriri kruele  
kvazaŭ ŝtono de glaci’  
ignore al mi.

Mi dume  
kovas vin en kor’,  
ne povas forgesi vin  
pro tiu ĝojiga hor’  
en mia memor’.

Mi drinkas  
por dronigi min  
en nevenkeblan trancon  
kun pika dolor’ en sin’  
daŭranta sen fin’.

Mi dormas  
tre malfacile  
turniĝadas de flanko  
al flanko maltrankvile  
kaj senkonsile.

Mi stelojn  
kalkulas vane  
enlite malespere.



Pensoj vagas promene  
triste ĉagrene.

Mi volas  
persistas pie  
ĝis via kor' moliĝos,  
vi ploros emocie  
pentos ĝemkrie.

Kara vi,  
mi penas ĉiam  
esti fidela firme  
al vi en la koro jam  
kun sincera am'.

Ankoraŭ  
mi kovas arde  
la sopiremon pri vi  
en la memoro garde,  
tenas vin alte.

## Edzo fariĝis kapro

(fablo)

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

La edzin'  
vera megero  
ŝian edzon verĝbatis  
kaj sakris kun fiero  
de malsincero.

Kiam li  
enhejme restis,  
ŝi ligis lin je pied'  
ŝnure, kaj lin molestis  
ordone gestis.

Je ŝia  
ŝnura ektiro  
li devis obei ŝin  
jen per tuja aliro  
agis laŭ l' diro.

Ne povis  
li elteni ŝin.  
Al li venis ideo,  
sin turnis al sorĉistin'  
ja por iluminin'.

La edzo  
laŭ ŝia instru'  
ŝnuris kapron je l' kolo  
kaj li sin kaŝis sen bru'  
dum ŝi dormis plu.

Post vekig'  
l' edzino time  
trovis kapron ligitan  
per ŝnur' nemalproksime  
sin movi mime.

Panike  
por bona rimed'  
konsultis sorĉistinon  
ŝi jen ĉe ties pied',  
kun kompleta kred'.

Tiu nun  
diris admone:  
“Pro viaj malbonfaroj  
Di' punas vin ordone,  
igas bastone

la edzon  
kapro timida.  
Se vi pente riparos  
vin per ago rapida  
hej, kaj decida,

mi helpos  
vere savi lin  
tuj el la kapra formo—  
la malfeliĉa destin',  
mi ne ĝenos vin.”

L'edzino

ploris amare,  
tenante l' kapron ĉe sin',  
ĵurante lin bonfare  
trakti pli kare.

Sep tagojn  
daŭris la rito  
de fastad' kaj oferad'  
revoki per invito  
lin sen hezito.

De tiam  
l'edzino ne plu  
malbone traktis l'edzon  
kaj vivis kun li kun ĝu'  
kaj bona kunglu'.



*\*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

## Zhuang Qixiong (Ĉinujo)



### Ĉagreno

—laŭ ĉinesko Xiangjianhuan\*  
Sur tur' mi pensis kun  
arka lun'.  
Per silento ŝlosiĝas aŭtun'.

Intima,  
senlima  
ĉagren-pun'.  
Nur pro disiĝ-senta oportun' !

*\*Xiangjianhuan (Ĝojo de intervidiĝo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun tri kaj kvar versoj respektive de 6,3,9 / 3,3; 3,9 silaboj laŭ rimaranĝo aaa / bb,aa*

## Tatjana Ĥomjakova (Rusujo)



### Mi ne scias precizan tempon de naskiĝo

#### Paĝoj el taglibro

Kiam mi komencis okupi sin pri astrologio, do penso pri tio, ke mi ne scias ne nur horon sed ankaŭ tempon de diurno de mia naskiĝo, senesperigis min. Kelkfoje mi penis ekscii pri tio de panjo, sed ĉiufoje ŝi respondis, ke ŝi ne memoras.

Mi naskiĝis je kvara infano en familio kaj je la tria el infanoj, kiuj restis vivaj. Ĉiuj kvar infanoj estis knabinoj, sed gepatroj volis havi filon. Tial kiam en kvara fojo naskiĝis knabino, tio estas mi, gepatroj tiel afliktiĝis ke longe ne iris en vilaĝan soveton por ke fari dokumentojn je infano. Sed kiam panjo tamen prepariĝis kaj iris pro atesto pri naskiĝo, do oni riproĉis ŝin pro malfrua vizito kaj enskribis, ke Tatjana Ĥmelnickaja (mia familia nomo ĝis geedziĝo) naskiĝis en 30-a de junio de 1954. Kvankam mi naskiĝis en 26-a de junio.

Post jaro de mia naskiĝo finfine naskiĝis knabo Vova. Kaj ankoraŭ post sep jaroj naskiĝis fratino Nataŝa. Tiamaniere mia panjo naskis ses infanojn, kvinopo el kiuj bonstate elkreskis kaj naskis siajn infanojn. Plej aĝa fratino Galina eĉ havas nepinon. Estas ne mirinde, ke kiam al panjaj sepdek jaroj kun superfluo mi komencis interesiĝi pri detaloj de mia naskiĝo, ŝi jam memoris nenion. Ŝi memoris pri tio, ke dum naskiĝo de plej aĝa filino Galina akuŝspasmoj komencis dum vojo, kaj ŝi penatingis al domo de parencoj. Ŝi memoras, ke akuŝo de filino Tamara ( nun ŝi

estas kuracisto) estis tre malfacila. Sangado komencis, kaj ŝi preskaŭ mortis. Ŝi memoris pri naskiĝoj de filo Vova kaj de lasta filino Nataŝa. Nataŝa estis nura, kiu naskiĝis en malsanulejo, ŝi pezis 5 kilogramojn, ĉiuj nomis ŝin “generalino”. Panjo memoris nenion nur pri mia naskiĝo kaj pri naskiĝo de dua filino, kiu en tria jaro mortis verŝajne pro skarlatino. Oni nomis ŝin Tamara kiel fratino-kuracisto. Panjo parolis, ke ĉiuj infanoj naskiĝis nokte, ke iun ŝi naskis sur planko, ke unu knabino naskiĝis tute faltoplana kiel maljunulino, ĉar patro pelis kaj batis gravedan ŝin, kiam li estis ebria. Jen ĉio, kion mi povis atingi post ĉiuj demandadoj. Mi penis ekscii ion de mia patro, sed li ankaŭ memoris pri naskiĝo de aliaj infanoj sed nenion memoris pri mia naskiĝo. Jam kiam mi elkreskis, mi atentis, ke pri mia naskiĝtago homoj kutime ne memoris, forgesis gratuli. Sed se iuj memoris, do tre nemultaj homoj, donacis donacojn tre malmultekostajn. Mi ĉiam preparis manĝotablon tre malmultekostan. Humoro en unua duono de tago ĉiam estis malgaja aŭ simple malbona. Mia edzo Igorj (dua edzo) ĉiam en la tago ofendis min. Iufoje tio ne estis, sed tiam bopatrino ofendis min. Ekzemple tiel okazis en mia jubilea naskiĝtago, en kvardekjara jubileo. Parencoj skribis al mi, ke en ĉi jaro Galina fariĝos tridekjara, kvardekjara, poste kvindekjara, kaj ĉiuj veturis al ŝi en urbon Novgorod. Sed mi estas pli juna ol Galina je 10 jaroj, kaj mi en tiuj jaroj fariĝis dudekjara, tridekjara, kvardekjara. Sed pri tio parencoj iel ne rememoris, kaj neniu pro jubileo al mi alveturis. Kvankam mia jubileo estis en tre oportuna tempo por vojaĝoj, tio estas somere. Mi esperas, ke kiam mi prosperos je astrologio, do mi ekpovos klarigi tiun fakton kaj proksimiĝos al solvo de horo de mia naskiĝo. Ja homoj, kiuj forgesas pri mia naskiĝtago, en kutima vivo rilatas al mi kore kaj afable.

Tamen mi jam nun ekscii ion pri tago de

mia naskiĝo. Malesperinte, ke gepatroj memoras nenion pri mia naskiĝo, mi skribis leteron el mia suna urbo Armavir al malproksima urbo Novgorod al fratino Galina. Ŝi tre proksimtempe skribis al mi pri ĉio, kion ŝi memoras en sia dek jaroj.

Ŝia letero estis por mi granda donaco. En mia taglibro, kiun mi skribas grandparte por miaj filoj kaj estontaj nepoj, mi citas la leteron.

### Letero de fratino Galina


Mia kara fratinetto!

Kiam vi naskiĝis, ni loĝis en malgranda domo en mezo de Popovka, unu el tri stratoj de vilaĝo Osmonj. Duonon de la argila dometo kun pajla tegmento kaj ruiniĝaj zavalenkoj okupis kuracpunto kun pufa, korpulenta helpkuracistino. Per ŝi nia patro estis ĉarmita. Mi kelkfoje vidis, kiel li penetris sub ŝian jupon, palpis molajn partojn de ŝia korpo, kaj ŝi ridis. Duan duonon okupis nia familio. Tio estis unu nura ĉambro kun senŝeliĝaj muroj, kun tri litoj kaj tablo. Ĉefaj ornamaĵoj estis fikuso kaj “abieta” – tia ĉiamverda planto kun delikataj, silksimilaj pingletoj. Mi poste nenie kaj neniam vidis tian planton. Jen en tia medio vi naskiĝis. Vivo de niaj gepatroj en tiu periodo estis tempesta. Patron oni pli ofte vidis ebrian ol sobran. De tempo al tempo ni malvarmiĝis en la ĉambro, ĉar nia patro en ebria haladzo rompis vitrojn de fenestraj kadroj, kaj panjo ŝtopis ilin per kusenoj. Aŭ li per hakilo rompis fornon, kiu staris preskaŭ en mezo de ĉambreto. Poste li mem ĉion ordigis kaj fanfaronis – kia li estas lertulo – kaj vitristo, kaj fornisto.

Vi naskiĝis tage, kaj akuŝigis la sama helpkuracistino. Mi pensas, ke tio estis en dua duono de tago. Mi promenis, kaj kiam mi revenis, oni diris al mi, ke ĉe mi naskiĝis fratinetto.

Vi ankoraŭ estis bebo, kiam ni translokiĝis

vivi en lernejo. La lernejo estis en la sama strato Popovka sed en komenco de la strato, apud elveturejo el vilaĝo. Tie ankaŭ estis unu ĉambro, sed la ĉambro estis pli granda, kaj konstruaĵo de lernejo estis pli bonkvalita. Tio estis klasĉambro kun aparta eliro, la vestiblo. Vintre la vestiblon surblovis per neĝo, kaj pordo de nia ĉambro malfermiĝis en neĝon. Ankoraŭ ĝis naskiĝo de frato Vova, li naskiĝis post 12-a horo de nokto, mi bone memoras, ke najbaroj prenis min pasigi nokton, ilia familia nomo estis Ciplovokov. Ili diris al mi, ke hodiaŭ mi ne povas pasigi nokton en hejmo, sed ili ne klarigis kialon. Matene ili gratulis min pro frato. Nu jen ankoraŭ ĝis naskiĝo de Vova vi ekmalsanis per kokluŝo. Ĝi elturmentis kaj senfortigis vin. Vi estis tia malforta, ke vi ne povas levi manon por forpeli muŝojn, kiuj svarme rampis sur vi. Mi kiel nun memoras tiujn grandegajn nigrajn muŝojn, kiuj sidas sur via vizaĝo, sed vi estis absolute indiferenta al ili.



*ilustraĵo de la aŭtorino*

Kuraco tiam kontraŭ kokluŝo ne estis. Mi memoras, ke panjo elportis vin en sunleviĝo sur roson, ĝis kiam ĝi ne sekiĝis, kaj pro tio ŝi mildigis vian suferadon. Vi estis malhele blua kiam tusegis. Vidi tion estis

turmente. El koridoreto-vestiblo pordo kondukis al malgranda provizejo kun malgranda fenestro. Foje panjo diris min: “Iru en provizejon kaj prenu de sur fenestrobreto boteleton, unu el du boteletoj, kiuj tie estas” Ŝi parolis tion iel strange. Mi estis observema knabino kaj komencis insisti, por ke ŝi diris al mi, kio estis en la boteletoj. Ŝi komence ne volis paroli, sed poste ŝi diris, ke en la boteletoj estas viva kaj malviva akvo. Se mi alportos vivan akvon kaj oni donos trinki al vi, do tiam vi resaniĝos. Se mi alportos la alia akvo, do... Mi kiel nun memoras tiun scenon. Mi diris al panjo, ke mi ne iros, mi timas, ke mi povos esti kaŭzo de morto de fratino Tatjana. Panjo akceptis mian rifuzon kun faciligo. Ŝi eĉ gajiĝis kaj diris, ke ŝi mem timas tuŝi al la boteletojn. Poste ŝi elĵetis ilin. Vi laŭgrade komencis reveni al vivo. Vivu fratineton longe-longe.

Kisas

Galina.

*notoj:*

1. *Zavalenko* estas tera nealta taluso laŭ eksteraj muroj de tradicia rusa vilaĝa domo.
2. *Fikuso* (en Latino *fikus*) estas ĉambra planto.



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo  
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,  
Chongqing, 400023, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin  
turnu al [www.elperno.cn/penlisto.htm](http://www.elperno.cn/penlisto.htm)

